

Verda Stacio

La ĉeĥoslovaka radio komencis elsendi ĉefe en Kbely la 18-an de majo 1923, ankoraŭ el sub tendo. La radiofona societo akceptis la nomon Radiojournal. Jam en tiu jaro 1923 eksonis unuafoje ankaŭ Esperanto, propagandaj paroladoj, kiujn preparis d-ro Aŭgustin Pitlík. Post kelkjara paŭzo en 1928 Jozefo Eiselt gvidis Esperanto-kurson de radio-stacio Praha. En 1930 Radiojournal en Moravská Ostrava lanĉis prelegojn pri kaj en Esperanto. Unu jaron pli frue en 1929 elsendis ankaŭ Bratislava Amuzajn Esperanto-horetojn, studio Košice Aliĝis en 1936.

Sed nin kompreneble plej multe interesas Brno. En 1927 Josef Bednář gvidis kurson de Esperanto kaj inter liaj kursanoj estis ankaŭ Marie Strejčková kaj ŝia filo Jiří Vítězslav Šamla, kiuj poste fariĝis motoroj de Verda Stacio. Post la kurso Esperanto en Radiojournal Brno silentiĝis kaj reaperis nur en 1931. Tiam s-ino Strejčková la 24-an de junio 1931 parolis pri „Napoleona ekspozicio en Slavkov“. La disaŭdigoj restartis la 17-an de aprilo 1932 okaze de la 9-a tutsokola kongreso en Praha kaj la programeroj aperis ĉiusemajne, ĉefe pri historio kaj kulturo de Ĉeĥoslovakio. Estis legataj fragmentoj el „Avino“ de Božena Němcová kaj el „Tridek jaroj en la ora nordo“ de Jan Welzl. Parolis Strejčková, Šamla, ankaŭ Theodor Kilian kaj aliaj.

La 1-an de marto 1933 unuafoje okazis unuhora elsendo sub reĝisorado de Dalibor Chalupa el la verkoj de Stanislav Schulhof, Ignát Herrmann, Voskovec kaj Werich, Vlasta Burian, Jaroslav Ježek kaj Josef Suk. Inter la deklamantoj estis ankaŭ poeto Ivan Blatný. Tiel ekestis Verda Stacio, kies direktoro fariĝis inĝ. Antonín Slavík. El la aktoroj estis kunmetita ensemblo TRAKT, t.e. Teatro- kaj radio-aktoroj, kiuj ricevis kurson de Esperanto. El tutnacie konataj artistoj estis tie Karel Höger, Vladimír Leraus, Jarmila Kurandová, František Kožík kaj lia edzino Zdena Švábíková. Prezidanto de TRAKT fariĝis Karel Urbánek, sekretario J. V. Šamla, sume preskaŭ tridek personoj.

Ĝis la dua mondmilito oni elsendis ĉirkaŭ 100 programojn, plejparte prelegojn. Tamen estis elsenditaj ankaŭ teatraĵoj, operetoj kaj operoj. Kelkaj tekstoj konserviĝis ĝis nun kaj estas prunteblaj en nia kluba biblioteko, nome:

Averĉenko: Forta karaktero - Silentema najbaro

Bass: Forlasita

Kožík: Sur rozoj sternite (tiam tre populara opereto)

Mahen: Lunatika

Legataj estis ankaŭ tekstoj, kiujn eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj, ekz. „RUR“ de Karel Čapek, „Mi en li“ de Vladyka kaj „Fokso-Nukso“ de Ignát Herrmann. Ankaŭ ĉi tiuj verkoj estas disponeblaj. Plie oni ludis verkojn, kies tekstoj eble troviĝas ie en la arkivo de Radio Brno: „Vendita fianĉino“ en traduko de Šamla, „Pola sango“ de Oskar Nedbal, „Grandhotelo Nevada“ kaj „Kavaleria patrolo“, ambaŭ de František Langer kaj „La milito ankoraŭ ne finiĝis“ de Karel Mužík. De Šamla restis broŝuro pri la historio kaj laboro de Verda Stacio antaŭ la milito.

Post la milito Verda Stacio transiris al Prago, ĉar la studio en Brno estis damaĝita per bomboj. En Prago aperis operoj en majstraj tradukoj de Tomáš Pumpr, nome „Vendita fianĉino“ de Smetana, „En la putoj“ de Blodek kaj „Najado“ de Dvořák. La lasta konserviĝis kiel registraĵo reeldonita en 1996 fare de asocio de blinduloj okaze de nia UK en Prago. La komentario legas Karel Höger, kantas Marie Tauberová, Beno Blachut kaj Karel Kalaš. Ĝi estas sola Najado de Tauberová, kiu ĝin neniam kantis en teatro, kaj sola registraĵo de Höger en Esperanto. En siaj rememoroj li mencias ankaŭ la Esperanto-elsendoj. De sinjorino Olga Horáková-Kožíková, la dua edzino de František Kožík, mi ricevis ankaŭ tekston de ŝia teatraĵo „Epizodo komenciĝas“ en traduko de Antonín Slanina - ankaŭ ĝin elsendis Verda Stacio en Praha.

En 1952 estis likvidita nia Esperanto-organizo, ĉar la internacia lingvo de laboristaro devis esti la rusa. Pro tio ĉesis ankaŭ la Esperanto-elsendoj. Mi klopodis iomete rememorigi ilin en interreto, kie

nun troviĝas ne nur la historio de Verda Stacio, sed ankaŭ sonregistraĵoj de famaj esperantistoj, faritaj en postaj jaroj, ekz. de Miloš Lukáš, Jiří Kořínek, Vlastimil Novobilský, Josef Vondroušek aŭ Eva Seemannová. „Najadon“ kiel profesian registraĵon ni ne povis uzi pro aŭtoraj rajtoj. Ankoraŭ mi volas rememorigi, ke ĉijare festos sian 100-jariĝon František Kožík kaj Karel Höger.

Miroslav Malovec

6.5.2009